



**Kontinueco kaj ŝanĝo
en MONATO**

**Ĉu Al Gore meritas
pacpremion?**




**La forgesitaj
helpantoj
de la esploristoj**

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Kontinueco kaj ŝanĝo

5

Unu el la karakterizaj trajtoj de nia magazino estas kontinueco. Tio validas ankaŭ por nia nova redaktoro, juna elstara kaj promesplena literaturisto. Vi ankaŭ rimarkos ŝanĝon en la aspekto de la magazino. Nia grafikisto klopodis doni al la magazino pli modernan kaj vigan aspekton, tamen en klara strukturo, kiel vi kutimas.

Ĉu Al Gore meritas pacpremion?

8

Kiam la Nobel-komitato anoncis, ke la iama usona prezidanto-kandidato Al Gore kaj la Interregistara Panelo pri Klimataj Ŝanĝiĝoj (IPCC) ricevis la pacpremion por la jaro 2007, medio-aktivistoj en multaj landoj ekĝojis. Sed ĉu Al Gore meritas tiun premion? Kiamaniere li agas por paco? Tiajn demandojn la aŭtoro de la artikolo starigis la 8an de novembro 2007 al Ole Mjøs, la estro de la Nobel-komitato pri paco.



Festivalo de sablaj skulptaĵoj

14

En la litova havenurbo Klaipėda estas organizata tradicia mara festo. Pasint-jare unuafoje dum la festo ankaŭ estis aranĝita festivalo de sablaj skulptaĵoj. 11 profesiaj skulptistoj, monde konataj majstroj el pluraj landoj kreis siajn verkojn.



La forgesitaj helpantoj de la esploristoj

17

Dum la dua duono de la 19a jarcento pluraj esploristoj, precipe britaj, travojaĝis Afrikon kaj tiel nerekte kontribuis al la koloniigo de la kontinento. Esploristoj kiel David Livingstone kaj Henry Morton Stanley ankoraŭ nun estas famaj. Pri iliaj helpantoj neniu memoras. Aŭtune de 2007 en la londona ekspoziciejo de la brita Royal Geographical Society (Reĝa Geografia Societo) okazis ekspozicio kun titolo „Bombay Africans” (Afrikanoj el Bombajo), kiu elstarigas ilian rolon.



FOTO DE LA KOVRILO DIANA GHAYTOR

politiko

Opinio	8
Ĉu Al Gore meritas pacpremion?	
Balkanio	10
La domo ĉe la krucoj	
Unesko	11
Novaj ideoj ĉe la ideo-laboratorio	

moderna vivo

Rusio	12
Beletraj prezidantoj	
Lernejoj	12
Sistemo ne imuna	
Albanio	13
Energia debato	
Instruado	13
Infanoj en la mezo	

arto

Festivalo de sablaj skulptaĵoj	14
Kinejoj kaj ciferoj: rekonkereto en Hungario	16

ekonomio

Afriko	17
La forgesitaj helpantoj de la esploristoj	
Ĉinio	18
Geedziĝoj stimulas konsumon	
Aŭstrio	18
Rekorda inflacio	
Baltaj landoj	19
Butikumanta Litovio	

libroj

Lingvo, Interreto kaj ... alio	20
Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko	21
33 jaroj da perfektigo	22

novelo

Analoj de Bailenambeann	23
Ĝentilaj animoj	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifo


Ŝtato de la paganto	MONATO			LA JARO aere	
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5
Belgio	EUR	49	58	29,4	5
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5
Britio	GBP	34	37	20,4	4
Bulgario	EUR	25	29	15	5
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5
Danio	DKK	365	395	219	40
Estonio	EUR	25	29	15	5
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5
Francio	EUR	49	53	29,4	5
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5
Grekio	EUR	45	49	27	5
Hispanio	EUR	45	49	27	5
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5
Hungario	EUR	25	29	15	5
Irlando	EUR	49	53	29,4	5
Islando	EUR	49	53	29,4	5
Israelo	EUR	41	45	24,6	5
Italio	EUR	49	53	29,4	5
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860
Kanado	CAD	73	78	43,8	9
Kipro	EUR	33	37	19,8	5
Koreio	EUR	41	45	24,6	5
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5
Kroatio	EUR	25	29	15	5
Latvio	EUR	25	29	15	5
Litovio	EUR	25	29	15	5
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5
Malto	EUR	33	37	19,8	5
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5
Norvegio	NOK	390	430	234	45
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5
Rusio	EUR	23	27	13,8	5
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5
Slovakio	EUR	25	29	15	5
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5
Svedio	SEK	460	495	276	49
Svislando	CHF	82	88	49,2	9
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5
Usono	USD	69	75	41,4	8
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighill Road, Kincardow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorese 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.

- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Polia:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kontinueco kaj ŝanĝo



Unu el la karakterizaj trajtoj de nia magazino estas continueco. Tio validas ankaŭ por redaktoroj, ekzemple tiuj por la rubriko Noveloj kaj Poezio. Dekomence ties redaktoro estis (jam tiam) fama poeto William Auld, kiu kompetente kaj fidele plenumis sian taskon ĝis 1998, do dum 18 (!) jaroj. Sekvis alia fama poeto, Geraldo Mattos, kiu nun bedaŭrinde pro alia grava tasko (redaktoro de la literatura revuo *Fonto*) devis rezigni. Do li plenumis sian taskon dum preskaŭ dek jaroj – ankaŭ longa tempo. Ambaŭ, cetere, ankaŭ estis prezidantoj de la Akademio de Esperanto.

Fama poeto li ankoraŭ ne estas kaj ankaŭ prezidanto de la Akademio de Esperanto li probable ne fariĝos baldaŭ, nia nova redaktoro. Por tio li estas simple tro juna: 21-jara. Sed Nicola Ruggiero estas elstara kaj promesplena literaturisto. Li nun estas la plej juna en nia skipo, sed tio signifas, ke li povus – se li eltenos – superi siajn antaŭulojn koncerne continuecon kaj daŭron ...

Kiel ĉiuj redaktoroj, ankaŭ li dependas de aŭtoroj, kiuj devas sendi taŭgajn kontribuojn. Ni do petas niajn novelistojn kaj poetojn: ne hezitu proponi al li viajn verkojn!

Jam sur tiu ĉi paĝo vi rimarkas ŝanĝon, kaj se vi plufoliumas, vi vidas, ke la internaj paĝoj havas novan grafikan aspekton. Kiel kutime, ankaŭ tiuj ŝanĝoj estas moderaj, la frontpaĝon ni lasis netuŝita – ankaŭ tio estas signo de continueco. Nia grafikisto Joan-Ferriol Masip i Bonet klopodis doni al la magazino pli modernan kaj vigan aspekton, tamen en klara strukturo, kiel vi kutimas. Skribu al ni, kio plaĉas kaj kio ne. Mi deziras multan plezuron kun nia magazino ankaŭ en la nova jaro. Kun bondeziroj por vi,

sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represo kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** Monato, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koi-gakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienso:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienso@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kal-verstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ĵa 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

La vualo, romantika kaj erotika

La redaktoro aldonis noton al la artikolo *La vualo, romantika kaj erotika* (MONATO 2007/11, p. 21-22), laŭ kiu la kristana teologo Tertuliano asertis, „ke estas tradicie ĉie, ke decaj virinoj uzas vualon”. La redaktoro aldonas: „Tiu anekdoto sugestas, ke porti vualojn ... estas ege malnova kultura tradiciaĵo.”

Ŝajnas al mi, ke tiu anekdoto krome kaj precipe asertas, ke jam antaŭ 1800 jaroj – tiel kiel hodiaŭ – granda amaso da virinoj ne ŝatis esti devigata porti vualon, kaj ke tiu „malnova kulturo” estas fakte ne kulturo, sed trudo, hieraŭ fare de teologoj kiel Tertuliano, hodiaŭ fare de aliaj nuntempaj trudantoj.

La vualo povas esti romantika kaj erotika, nur se virinoj rajtas elekti, kiel sin vesti. Se ne, ĝi estas malliberigilo.

Annarosa ANDREI
Italio

La vualo, romantika kaj erotika (2)

Lastatempe, kelkaj politikistoj, ĵurnalistoj kaj ceteraj kreantoj de opinio, manifestas ke enmigrintoj devas adaptiĝi al la kulturo de la lando kiu ilin akceptas. Ĉu ili nepre devas?

Enmigrintoj al kutimiĝas al la nova landa kulturo laŭ bezono kaj sufiĉo, t.e. por labori, por veturi, por aĉeti, por ĝui sanservon, por alporti eventualajn infanojn al lernejo, ktp.

Depende de la lando, enmigrintoj devos lerni nova(j)n lingvo(j)n, kutimaj manĝaĵoj ŝanĝiĝas... Pri ĉiuj ŝanĝoj enmigrintoj ne decidas, sed ja la bezono adaptiĝi. Plejcerte, oni adoptos tradiciojn kaj viv-arangojn laŭplaĉe, aliajn ili simple rifuzos pro malŝato.

Kelkaj okcidentanoj fervore asertas, ke islama vualo malliberigas vir-

inojn, kaj, ke islamaj knabinoj devas agi samkiel tiuj lokaj. Tial ili elspezu grandan kvanton da mono en la frizosalono, ili senharigu la kruojn al si, ili vestu sin per altaj kalkanumaj ŝuoj detruantaj kiun ajn vertebran kolumnon, ili montru dekoltaĵon intermaman...

Ĉu okcidentaj virinoj estas plene liberaj? Ĉu okcidenta societo rajtas lecionoj pri libereco?

Ferriol MACIP I BONET
Katalunio

Dialogo unudirekta

MONATO (2007/6, p. 8) raportis pri interesa eksperimento de ĉeĥa ĵurnalo. El 27 komisionanoj de Eŭropa Unio nur du respondis ĉeĥe kaj unu angle. Tio montras la fiaskon pri politiko je lingva diverseco. Mi vetas ke, se la ĵurnalo skribus angle, ĝi ricevus pli da respondoj.

Laŭ mi estus interese testi la samajn komisionanojn esperante, sed mi ne scias, kion demandi kaj mi ne konas la nomojn de ĉiuj komisionanoj. Pri tio Jindřiska Drahotová eble povas nin helpi.

Michel MARKO
Francio

Tamen estas diferenco: la ĉeĥa estas oficiala lingvo de la Unio, kaj sekve la civitanoj rajtas uzi ĝin en siaj kontaktoj kun la Komisiono. Esperanto ne estas oficiala lingvo de EU. (red.)

Ĉu Flandrio kaj Valonio divorcu? (3)

Eddy Van den Bosch (MONATO 2007/12, p. 6) prave skribas, ke oni povus plifortigi Belgion per kulturaj ligiloj, i.a. per pli da renkontiĝoj inter flandraj kaj valonaj kultur-grupoj.

Bonege! Sed en kiu lingvo okazu tiaj renkontiĝoj? Ĉu en Esperanto? Ĉu en la angla? Aŭ ĉu nur en la franca, pro la fakto, ke tro da franclingvanoj ne komprenas la nederlandan?

Gravega problemo estas, ke ĝenerale franclingvanoj, kiuj proprovole elmigras en flandran komunumon ne volas (ne kapablas?) paroli la nederlandan. Mi mem estas franclingvano, kiu loĝas en Flandrio, sed neniam mi almozpetis lingvajn facilecojn, kvankam mi ne majstras pri la nederlanda.

Mi ne bone komprenas, ke franclingvanoj ricevas lingvajn facilecojn en 6 flandraj komunumoj, sed ke 3 valonaj komunumoj rifuzis tiun rajton al nederlingvanoj!?

Se, laŭ la valona logiko (kiel klarigas Marc Demonty sur la sama paĝo), valoras nur la *individua rajto*, tiam en pluraj bruselaj municipoj aliaj etnaj grupoj rajtus posedi lingvajn facilecojn por aliaj lingvoj ol la nederlanda kaj la franca. Tro ofte tia argumento estas nur preteksto por ne eklerni alian lingvon.

Ideala solvo estus ja uzi nur Esperanton por la rilatoj inter la du lingvaj grupoj ... aŭ la anglan!

Germain PIRLOT
Belgio

Ĉu Flandrio kaj Valonio divorcu? (4)

Legantode MONATO raportis (2007/11, p. 8-10), ke ĉiujare miliardoj fluas de Flandrio al Valonio. Ĉiumatene centmiloj da homoj el Flandrio kaj Valonio alvenas en Bruselo por tie labori. Ĉu iu kalkulis la monfluojn el kaj al Bruselo? Ĵus mi aŭdis, ke ene de Flandrio estas grandaj monfluoj de oriento al okcidento, ĉar en okcidento la loĝantaro estas multe pli maljuna. Ĉu la Flandroj pro tio intencas apartigi la flandrajn provincojn?

Cetere, mi ne kredas je tiaj kalkuloj, ĉar ĉiu elektas la ciferojn, kiuj estas plej konvenaj al la propra opinio. Oni ne tro kalkulu, sed konsciu, ke longtempe stabila asekursistemo kiel socia sekureco estu bazita sur laŭeble granda nombro da personoj; oni do ne dispecigu Belgion, sed plikonstruu kaj unuecigu la sistemon eŭropele.

Roland ROTSAERT
Belgio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versio de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

La pluŝurso kaj la profeto

de Paul GUBBINS



TEDDYBEARFRIENDS.CO.UK

Mankas al islamanoj en Sudano du aferoj: racio kaj oficisto pri publikaj rilatoj. Ke mankas racio, eble ne surprizas: racio kaj religio – ajna religio – tiom apudas, kiom Universala Esperanto-Asocio kaj la Esperanta Civito. Ke mankas oficisto pri publikaj rilatoj, simple bedaŭrinde.

Pasintan novembro brita instruistino, 54-jaraĝa Gillian Gibbons [ĝeln gebns], el Liverpolo, dungitino ĉe elementa lernejo en Ĥartumo, Sudano, estis arestita, ĉar ŝi permesis, ke pluŝurso uzata dum instruado portu la nomon Muhamado. La nomo estis proponita de sep-jaraĝa knabo en ŝia klaso, kiu mem nomiĝas Muhamado, sed la instancoj en Ĥartumo akuzis la instruistino, ke ŝi insultis islamon, semis malamon kaj primokis religiajn kredojn.

Vipado

Knabo, ŝajne, rajtas porti la nomon de la profeto, pluŝurso tamen ne. Simpla kaj naiva – tamen fatala – eraro farita de instruistino, kiu nur en septembro eklaboris en Sudano kaj konis nek la landon, nek la tiean religion. Tamen la instancoj en Ĥartumo tuj arestis la britinon kaj minacis puni ŝin aŭ per duonjara enkarcerigo aŭ per vipado.

Rezulto: municio por tiuj en Okcidento, kiuj volas kredi, ke ĉiuj islamanoj estas fanatikuloj kaj frenezuloj. Memevidente, ili ne estas: en Britio la islama komisiono pri homaj rajtoj kritikis Sudanon, dirante: „Tio kondukas eble al kondamno de homo senkulpa kaj cetere al la fortigo de islamofobio kaj al plia demonigo de islamo.” Evi-

dente: la afero sekvas protestojn kaj eĉ tumultojn en 2006 pri la aperigo en Danio kaj alilande de „insultaj” karikaturoj pri la profeto.

Kviete kaj konfidence

Ne gravas la demando, kial islamismo sentas sin minacata de pluŝursoj, karikaturoj kaj (mis)uzo de la nomo Muhamado. Kiel dirite, religio kaj racio ne samspire elparoleblas. Gravus la demando, kial saĝulo ne diris kviete kaj konfidence al laŭdire bona instruistino, ke en islama lando oni ne agas tiel, ke ŝi bonvole ne plu faru. Tiel fino de la afero.

Tamen post kvar tagoj, dum kiuj islamismo sin montris timema, venĝema kaj ekstrema, kortumo deklaris sinjorinon Gibbons kulpa pri unu el la akuzoj, nome ke ŝi insultis la religion. Oni kondamnis ŝin al 15 tagoj en malliberejo kaj al sekva deportado. Robert Boulos, la estro de la lernejo, kie okazis la „insulto”, diris, ke la decido de la kortumo estas „tute justa”.

Alia kaj lasta demando pri la afero priplorinda. Kial islamismo en Sudano ne disponas pri oficisto pri publikaj rilatoj, kiu eble estus povinta evitigi ĉi tiun interreligian, internacian, ĉefe interhoman katastrofon? ■



RAVI



OPINIO

Ĉu Al Gore meritas pacpremion?

Kiam la Nobel-komitato anoncis, ke la iama usona prezidanto-kandidato Al Gore kaj la Interregistara Panelo pri Klimataj Ŝanĝiĝoj (IPCC) ricevis la pacpremion por la jaro 2007, medio-aktivistoj en multaj landoj ekĝojis. Sed ĉu Al Gore meritas tiun premion? Kiamaniere li agas por paco? Tiajn demandojn la aŭtoro de la suba artikolo starigis la 8an de novembro 2007 al Ole Mjøs, la estro de la Nobel-komitato pri paco.

Tuj korektas Mjøs: la ĉi-jara premio estas donata kune al IPCC pro ĝia scienca laboro pri klimatsanĝiĝoj kaj al Al Gore pro lia ega laboro por disvastiĝi la konojn produktitajn de IPCC. Laŭ Mjøs temas ne pri nova difino de paco. Jam en 1904 ricevis organizaĵo pacpremion, same kiel tiuj, kiuj batalis por

homaj rajtoj, kontraŭ nukleaj armiloj aŭ en 1970 eĉ pro provoj plibonigi gren-produktadon.

Stabiligi la klimaton

Nenio tia troviĝas en la testamento de Alfred Nobel de 1896, kiu teorie estas la bazo de premia aljuĝo. Tamen laŭ Mjøs, nepre necesas reinterpreti la

intencon de la testamento: ĝuste tion faras la Nobel-komitato jam de la komenco. Cetere la nocio „paco” estas larĝa kaj konstante redifinata. Fakte, en sia oficiala anonco pri la ĉi-jara pacpremio, la Nobel-komitato deziras „kontribui al pli forta fokusado pri metodoj kaj decidoj necesaj por stabiligi la klimaton kaj malpliigi la minacon kontraŭ la homara sekureco”.

La Nobel-komitato pri paco konsistas el kvin homoj, elektitaj por minimume ses jaroj de la norvega parlamento. La reguloj pri elektoj de tiuj homoj postulas, ke ili reprezentu la variecon politikan de la norvega parlamento. La estro, Ole Mjøs, estas ano de la kristana popola partio (politike centra). Tamen, ĉar troviĝas en la Nobel-komitato reprezentanto de la dekstra partio, kiu ĝenerale neas la gravecon de klimataj problemoj, leviĝas la demando, ĉu la aljuĝo de la premio okazigis apartajn diskutojn. Mjøs diplomate rifuzis publikigi la internan traktadon survoje al la decido, lakone dirante: „La decido de la Nobel-komitato estis unuanima”.

Akademiasaj premioj

Kial cetere tiu ĉi Nobel-premio tiom gravas? Mjøs atentigas, ke laŭ la oksforda vortaro la Nobel-pacpremio



TIM ERENETA

estas la plej fama premio en la mondo. Li listigas tri klarigojn. Unue, la Nobel-pacpremio apartenas al la familio de akademiaj premioj: la kvar aliajn Nobel-premiojn (pri medicino, fiziko, kemio kaj literaturo) aljuĝas svedaj akademioj. Tiel aperas sinergio inter fameco kaj valoro de la premioj. Due, la Nobel-premio havas longan historion: la unua estas aljuĝita en 1901. Trie, la listo de prestiĝaj laŭreatoj plifirmigis la prestiĝon de la premio mem.

Cetere, laŭ Mjøs, pli kaj pli estiĝas intereso pri la pacpremio el ekster Eŭropo. Kiam pasintjare Mohammad Yunus el Bangladeŝo ricevis la premion, li fariĝis heroo ne nur en sia lando sed ankaŭ en tuta Azio. Tiel, ekde la 1970aj jaroj, la pacpremio pli kaj pli internaciĝas.

Ne indas demandi al Mjøs, kiu povus esti la venontjara nobelpremioto. Sed pri la ĉi-jara premio li diras: „Atendu kelkajn jarojn, kaj vi vidos, ke eble ne estus tute stulte doni pacpremion al tiuj, kiuj provas solvi klimatsanĝiĝojn“. Evidentas, ke, laŭ Mjøs, la ĉi-jara premio tute akordiĝas kun la spirito de Alfred Nobel. Verŝajne ankaŭ en la estonteco troviĝos inter la premiitoj tiuj, kiuj laboras por verda paco. Ĉu eble *Greenpeace*?

Claude ROUGET



JACOB BÖTTER

Kial la Nobel-premio estas aljuĝita de la norvega parlamento?

Alfred Nobel estis svedo, kiu riĉiĝis pro siaj industriaj eltrovaĵoj, i.a. dinamito. Sen heredonto, li verkis detalan testamenton pri la disdivido de sia mono kaj pri la kvin premioj. Kvar el la premioj estas deciditaj de svedaj akademioj, dum la pacpremio estas decidita de komitato elektita de la norvega parlamento. Kial Norvegio? Kiam Nobel mortis en 1896, Norvegio estis sub sveda administracio, sed kun propra parlamento. La parlamentanoj decidis nenion rilate la eksteran politikon de Svedio-Norvegio: tion rajtis nur la sveda parlamento. Nobel opiniis, ke norvegaj parlamentanoj estus pli neŭtralaj ol la svedoj por

aljuĝi la pacpremion. Kvankam Norvegio sendependiĝis de Svedio en 1905, la aljuĝo de la pacpremio restis tasko de la norvega parlamento.

Kiel okazas la decido pri Nobel-premiato?

Ĝis la 1a de februaro kolektiĝas nomproponoj en la Nobel-instituto en Oslo. Proponojn rajtas prezenti nur membroj de naciaj parlamentoj kaj registaroj, membroj de internaciaj kortumoj, profesoroj universitataj, antaŭaj Nobel-premiitoj, kaj kelkaj aliaj. En la lastaj jaroj la Nobel-komitato ricevas ĉ.180 nomproponojn. Dum la unua kunveno en februaro, la kvin membroj de la komitato rajtas aldoni nomon, se la nomo de la aktuala kandidato ne jam troviĝas en la

listo. Poste laboras la Nobel-instituto por havigi al la komitato la necesajn informojn pri la kandidatoj. La komitato ne publikigas, kiel ĝi interne laboras kaj kiel ĝi decidas. Ne gravas, kiom da homoj proponis la saman nomon. Se unu membro de la komitato malkonsentas kun la plimulto, li/ŝi rajtas elpaŝi el la komitato. Tio malofte okazis, plej laste en 1994, kiam komitatano malkonsentis, ke Arafat ricevu la pacpremion. Ĝenerale la decido estas unuanima kaj publikigita meze de oktobro. La Nobelpremia ceremonio okazas ĉiam en Oslo la 10an de decembro, mortodato de Alfred Nobel¹.

1. Vidu ankaŭ la artikolon *Alfred Nobel: nobelo inter la sciencistoj kaj lingvistoj* en MONATO 2006/12, p. 19.

La domo ĉe la krucvojo



ANDREW DUNLOP

Franca kardinalo iam diris kiel malbenon: „Vi vivu en interesa tempo”. Ni, kiuj loĝas en Balkanio, aparte en Serbio, evidente tiel vivas.

Mi scias, ke pri Serbio kaj pri serboj ekzistas stereotipoj. Sed stereotipoj ne ĉiam enhavas veron. Tamen ne senkiale kreiĝas stereotipoj. Kulpas parte la loko de la lando kaj la malobeemo de serboj, kiuj ne rekonas aŭtoritaton.

Kulpas ankaŭ la historio. Serboj vivis en ok ŝtatkadroj: princolando, poste reĝolando kaj socialisma lando, ĝis la nuna demokratia Serbio. Serbio mem estis orienta despotejo, monarkio, komunista ŝtato kaj nun parlamenta demokratio. Ĉi tie inter 1835 kaj 2006 ŝanĝiĝis 11 fojojn la konstitucio. Eĉ nun oni parolas pri nova konstitucio.

La limoj de Serbio estis ŝanĝitaj

10 fojojn ekde de la unua serba ribelo kontraŭ la turkoj. Usono kaj aliaj volas, ke sekvu ankoraŭ plia ŝanĝo: Kosovo apartiĝu de Serbio. Pri tio, tamen, ekzistas diversaj opinioj. Tiel minacas nova krizo, kiu eble kondukos al aliaj displitiĝoj en Eŭropo.

Perforte forigitaj

Cetere memorindas, ke depost 1835 Serbio estas tri fojojn okupita kaj tri fojojn liberigita. Simile, dum la lastaj 100 jaroj la ĉefurbo de Serbio, Beogrado, estas kvin fojojn bombardita. Ĉiuj regantoj de Serbio, krom princo Miloš kaj marŝalo Tito, estis mortigitaj aŭ perforte forigitaj.

Amiko mia, filozofo, diris: „Kiun ni kulpigu? Ni konstruis nian domon sur la vojo, pli trafe, en la krucvojo inter orien-

to kaj okcidento. Tio signifas, ke ĉiu deziras esti posedanto de tiu krucvojo.”

Tamen ĉi tie homoj ĝojas kaj malĝojas; urboj ekzistas kiel aliaj eŭropaj metropoloj; politikistoj de ĉirkaŭ 100 politikaj partioj interbatalas; ĵus finiĝis internacia festivalo pri novaj teatraj tendencoj; pasintsomere okazis granda festivalo de trumpetistoj el la tuta mondo; fremdlandanoj aĉetas serbajn firmaojn; en galerioj kaj kulturaj centroj organizas ekspoziciojn konataj kaj nekonataj pentristoj kaj skulptistoj ktp. Alivorte: Serbio vivas kiel iu ajn alia lando.

Internaciaj policistoj

Aliflanke Serbio apartenas kvazaŭe al la tiel nomata tria mondo. Ĝi situas en Eŭropo, sed ne membras en Eŭropa Unio (EU). Serbaj kaj internaciaj policistoj serĉas militkrimulojn de la lasta milito, Ratko Mladić kaj Radovan Karadžić: ilin serĉi estas kondiĉo por interparoli pri EU. Ĉe la tiel nomata administralimo kun Kosovo estas konfiskitaj uniformoj de la serba armeo, kiujn kosovaj albanoj pretigis por ŝajnigi atakon de serba armeo al Kosovo. En Vieno reprezentantoj de Kosovo kaj la serba registaro interparolas pri la estonteco de tiu ĉi regiono.

Dum jaroj daŭras la batalo kontraŭ diversaj bandaĉoj. Ekzistas kaj funkciaj mafioj: ilin forigi ne facilas. Regas ankaŭ diskutoj pri lingvoj. La iama serbokroata, grava pro politikaj kialoj, fariĝas nun la serba, la kroata, la montenegra, ktp. Por novaj ŝtatoj ekzistu novaj, propraj lingvoj: en Balkanio ne eblas komunlingvumi kiel en Anglapanarolujo.

Do en Balkanio kaj en Serbio nenio nova. Interdividoj, diskutoj, malicoj. Dume la sezonoj sekvas sian ritmon. Eble, ankaŭ, la homoj.

Dimitrije JANIĆIĆ

Novaj ideoj ĉe la ideo-laboratorio

Ĉiun duan jaron la landaj komisionoj de Unesko, la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, kunvenas en Parizo kvazaŭ parlamento por decidi pri nova politiko. En 2007 revenis Singapuro kaj unuafoje eniris Montenegro, kies prezidanto surprizis, parolante en sia lingvo kaj ne provizinte la tradukservon per teksto en unu el la ses oficialaj lingvoj.

Fakte, li ne estis la sola, kiu uzis sian lingvon. La ministro pri edukado el Brazilo parolis portugale, same lia koleginino el Portugalio, kiu franclingve intervenis nome de Eŭropa Unio, sed portugale nome de sia lando. La prezidanto de Bulgario intervenis en la bulgara, la prezidanto de Grekio en la greka, la vicministro pri eksteraj rilatoj de Italio en la itala, ktp. Ŝokis en tiu ĉi etoso la interveno, en la angla, de la sveda reĝo, eĉ se la enhavo pri la planedo pensigis.

Granda entrepreno

Unesko funkcias kiel granda entrepreno, kiu devas prizorgi konstruaĵojn, laborantojn kaj programon, kaj mastriumi buĝeton. Unuafoje Unesko proponis tri variaĵojn de buĝeto kaj estas elektita la plej drasta, tiel ke salajroj superos la sumon disponeblan por agi. Sed pli kaj pli necesas antaŭvidi la pensiojn de laborintoj. Tamen la proporcio inter seksoj kaj landoj estas tre atentita, de balaisto ĝis programestro. Nova ankaŭ estas la postulo, ke dungitoj flue parolu du laborlingvojn (komprene anglan kaj francan). Ĝenerala tendenco estas trovi eksterbuĝetajn monfontojn.



Ĉiun duan jaron la landaj komisionoj de Unesko kunvenas en Parizo

Por elturniĝi, Unesko kreas pli kaj pli da oficejoj ekster la centra oficejo en Parizo. La avantaĝo estas duobla: la prizorgado de la oficejo, la salajroj de la dungitoj kaj la lokaj elspezoj estas preskaŭ centelcente pagataj de la koncerna lando, kiu siavice fieras pro „sia” Unesko-oficejo. Ĉi-jare estas decidite krei Oficejon pri Sporto kaj Virinoj en Grekio. Kandidatiĝis ankaŭ Tripoli por subteraj akvoj kaj Kazahio pri renovigeblaj energioj.

Planoj kaj rezultoj

Kiel ĉe iu ajn organizaĵo, nepras taksu ne nur planojn, sed ankaŭ rezultojn. Analizi la investitajn fortojn kaj kompari kun la atingitaĵoj ĝis nun neniam okazis. Same pri plenumado de ĉefaj decidoj. Membro-ŝtatoj voĉdonas por rezolucio aŭ normiga teksto kaj poste forgesas ĝin subskribi: tiel la decido restas senvalida. Inter 31 tekstoj prioritatas 11: pri diskriminacio en instruado, laborkondiĉoj de la instruistaro, edukado al paco kaj homaj rajtoj, laborkondiĉoj de esploristoj, instruado al plenkreskuloj, statistikoj pri instruado, kondiĉoj por artistoj, teknika kaj profesia instruado, kaj laborkondiĉoj de instruantoj en universitatoj.

Inter la diversaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) konstatigis, ke pluraj prizorgas la samajn temojn. Antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis restrukturado. Tute klare Unesko konservas edukadon, scienccon (naturajn kaj homajn) kaj komunikadon-informadon. Plurfoje estas aludita la rolo de Unesko kiel ideo-laboratorio kaj konscienco de la mondo. Oni memorigis, ekzemple, ke jam antaŭ 30 jaroj Unesko interesiĝis pri bioetiko aŭ kultura diverseco.

Lingvo kaj kulturo

Do por UN 2008 fariĝos internacia jaro de la lingvoj. La laboron kunordigos la fako „kulturo” de Unesko. Jen okazo por akcenti tion, kion defendas esperantistoj: rilatojn inter lingvo kaj kulturo.

La jaro 2008 vidos ankaŭ la 60-jariĝon de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Aparte emfazataj estos la rajtoj de la tria generacio: rajto je lingvo, rajto je partopreno en scienca kaj kultura vivo. Pri tio laboris antaŭ kelkaj jaroj komisionoj de UEA ĉe Unesko: necesas tamen en tiu ĉi jaro aktiva partopreno je ĉiu nivelo.

Renée TRIOLLE
(Reprezentanto de UEA ĉe Unesko)

RUSIO

Beletraj prezidantoj

ELIZABETH PADAWER

En marto 2008 rusianoj elektos la prezidanton de la Rusia Federacio. Dume aŭskultantoj de la radiostacio *Eĥo Moskvi* (Eĥo de Moskvo) povas ĉiusemajne elekti „prezidanton” inter herooj de rusaj literaturaĵoj.

En ĉiu radioelsendo oni konsideras kvar kandidatojn el unu aŭ kelkaj verkoj. Unu el la kandidatoj venkas per interreta voĉdonado antaŭ la radioelsendo mem, kaj la tri aliaj estas pridiskutataj dum la

elsendo. Oni povas telefoni kaj agiti por aŭ kontraŭ kandidatoj. La aŭskultantoj ankaŭ estas informataj pri opinioj de famaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj politologoj. Poste okazas telefonaj voĉdonadoj, kaj finfine aŭskultantoj elektas inter la interreta kaj telefona venkintoj.

Por la „prezidanta posteno” oni proponas neordinarajn figurojn, ne ĉiam pozitivajn, ne ĉiam protagonistojn. Ekzemple, el la romano de M. A. Bul-

gakov *La majstro kaj Margarita*, en elektoj partoprenis Poncio Pilato, Azazel, la kato Behemoto kaj Kerubjev (venkis Behemoto). Dum konkurado de fabelaj herooj Ivan la Malsaĝulo superis la fortulon Aloŝa Popoviĉ (Aleĉjo, filo de popo), Koŝĉejon la Senmortan kaj la arbaran monstron Solovej-razbojnik (Najtingalo-rabisto).

Estis du konkuradoj ekskluzive por virinoj. En la unua sukcesis Tatjana Larina el *Eŭgeno Onegin* de A. S. Puŝkin. Ŝi ŝajnis al aŭskultantoj pli taŭga por prezidanteco, ol Koroboĉka el *Malvivaj animoj* de N. V. Gogol, Nataŝa el *La majstro kaj Margarita* kaj Ranevskaja el *Ĉeriza ĝardeno* de A. P. Ĉeĥov. En la dua elsendo venkis Sonja Marmeladova el *Krimo kaj puno* de F. M. Dostojevskij (kun 52 % kontraŭ 48 % por Nataŝa Rostova el *Milito kaj paco* de L. N. Tolstoj).

En aliaj elsendoj konkuradis kvaropoj el verkoj de A. S. Gribojedov, N. V. Gogol, L. N. Tolstoj, A. P. Ĉeĥov, I. Ilf kaj Je. Petrov, F. M. Dostojevskij, M. A. Bulgakov, A. S. Puŝkin, M. Ju. Lermontov kaj I. S. Turgenev.

La elsendo, kiu nomiĝas „Superpotenco”, unuafoje aperis somere, kiam feris la kutima politika programo *Potenco*. En *Superpotenco* estas iom da politiko, tamen ĝi ĉefe celas revenigi aŭskultantojn al bonega rusa literaturo.

Anna kaj Mati PENTUS

LERNEJOJ

Sistemo ne imuna

Du ĝemeloj, denaske infektitaj de la retroviruso HIV, antaŭ nelonge komencis la unuan klason ĉe elementa lernejo en la albana ĉefurbo Tirano.

Negative reagis gepatroj de la aliaj lerneĵanoj. Ili postulis, ke la lernejestro eligu la infektitajn infanojn: se ne, ili ne plu sendos tien siajn infanojn. La gepatroj opiniis, ke la du ĝemeloj infektos ankaŭ iliajn infanojn.

Instruistoj, kuracistoj kaj oficistoj de la ministerio pri edukado intervenis, klarigante, ke venas nenia danĝero de la infektitaj ĝemeloj, kiuj akiris la viruson

de sia patrino, mem infektita de nun mortinta edzo. La spertuloj diris, ke la viruso, kiu atakas la imunsistemon, povas penetri nur per seksumado, sango-transdonado aŭ infektigo de la patrino.

La koncerna ministro, Genc Pollo, informis la gepatrojn: „Moderna pedagogio postulas, ke ankaŭ malsaniĝintaj infanoj, ne nur pro HIV, rajtas kaj devas kunstudi en la samaj lernejoj kie aliuloj. La samo okazas kun anoj de malplimultoj, kiuj sentu sin dignoplenaj en la homa komunumo, por ke ili prosperu kaj sukcese antaŭeniru.”

Bardhyl SELIMI

Energia debato

Jam delonge suferas Albanio pro nesufiĉa elektra energio. En la lasta duonjarcento estis konstruitaj pluraj akvocentraloj sur la rivero Drin: laŭ akvorezervejoj Albanio okupas post Norvegio pokape duan lokon en Eŭropo. Tamen pro sekeco, manko de investado kaj malbona mastumado ĉe la centraloj, albanoj devas toleri longajn senelektrajn horojn.

Rezulte, la albana ĉefministro Sali Berisha [beriŝa] proponis konstrui nuklean centralon. Tion li anoncis en novembro. Tamen la propono aspektas strange, ĉar en la regiono oni planas nukleajn centralojn, ekzemple en Bulgario.

Cetere la opozicio kritikis la registaron, dirante, ke tiu kapablos nek entrepreni grandan laboron tian nek ĝin bone mastumi post konstruado.

Pri la projekto interesiĝas eksterlandaj kompanioj kaj bankoj. El Italio kaj el

Bruselo venis kuraĝigaj vortoj. Kontraŭe Grekio estas ŝokita, kaj la irana ambasadoro en Albanio tuj protestis, ke Eŭropo pritraktu la aferon laŭ kriterioj aplikeblaj al Irano.

Bardhyl SELIMI



Infanoj en la mezo

En Aŭstrio infanoj vizitadas lernejon ekde la sesa vivojaro. Kvar jarojn ili iras al komuna „elementa” lernejo; poste kvin jarojn aŭ al gimnazio aŭ al tiel nomata ĉeflernejo, se ili estas malpli inteligentaj.

Sed tio estas nur teorio. En Vieno la plimulto iras al gimnazio; en la kamparo en diversaj regionoj preskaŭ ĉiu al ĉeflernejo. Ekde jardekoj aŭstraj socialdemokratoj proponas komunan lernejon ĝis la 15a vivojaro, kiun ili nomas „nova mezlernejo”. Tiun daŭre kontraŭas la kolia partnero, la konservativa partio.

Ekde septembro 2008 realiĝos en kelkaj urboj tiaj „komunaj lernejoj”, kiujn fakte vizitos nur kelkaj infanoj. Jam nun oni prognozas malsukceson de la ĉi-specaj lernejoj: malsufiĉas mono, edukitaj geinstruistoj kaj lokaloj.

Walter KLAG



Tiel varbas socialdemokratoj por la tiel nomata nova mezlernejo.

Festivalo de sablaj skulptaĵoj

Ĉiujare meze de somero en la litova havenurbo Klaipėda estas organizata tradicia mara festo. Pasint-jare unuafoje dum la festo ankaŭ estis aranĝita festivalo de sablaj skulptaĵoj. 11 profesiaj skulptistoj, monde konataj majstroj el Pollando, Belorusio, Ukrainio, Italio, Rusio, Finnlando, Aŭstrio, Bulgario siajn verkojn kreis dum 52 horoj kaj por tio ĉiu uzis po 25 kubajn metrojn da sablo.

Inspirataj de la ideo la festivalorganizantoj zorgis pri speciala sablo kun pli granda kvanto de argilo por ke la skulptaĵoj restu vivaj pli longe ol ĝis la unua pluvo.

Aliaj fantazioj de artistoj.





Klaipėda, la urbo de lumturoj.

Skulptistojn helpis lokaj artistoj, studentoj. La verkoj respegulis maran temon. Ilia stilo variis inter modernismo kaj klasikismo.

Ĉiuj artistoj ricevis monpremiojn kaj vitrajn skulptaĵojn kun sablo de Balta Maro. Kiel la plej sukcesa estis elektita skulptaĵo de la itala artistino Michela Ciapini *Fraŭlino en la boato*.

LAST



La plej sukcesa verko „Fraŭlino en la boato”

Klaipėda, litova havenurbo



Kinejoj kaj ciferoj: rekonkereto en Hungario



*La oka distrikto:
Ĉu la hungara kino eliras el getto?*

Pri „la fina venko de Holivudo” mi skribis en 1995 ĉi-revue (MONATO, 1995/6, p. 19), citante ŝrumpajn ciferojn pri kino en Eŭropo kaj Hungario. Ĉu 12 jarojn poste ni havas kialojn por pli optimismi pri la lando, kiu jam en 1988 pioniris per la filmo *Mefisto* kun profesia dublado en Esperanto?

Unue: filmojn nuntempe oni facile aĉetas sur DVD-disko, eĉ elŝutas el la reto ... se hazarde ni tamen volas ĝui filmon en tradicia maniero, kien do iri en Hungario por fari tion? Tutlande restas ĉirkaŭ 500 kinejoj: sepono de la kvanto antaŭ 20 jaroj. En la ĉefurbo mem la kinejoj en 1985 nombris 257; en 1995 ili estis 51; nuntempe restas en Budapeŝto trideko da projekciejoj, kies triono estas kinejaj kompleksoj en aŭ apud grandaj aĉetcentroj. Elstaras nur la plursalonigo kaj arkitektura renovigo de kvin tradiciaj, urbocentraj kinejoj, inter aliaj la mita *Corvin*, kies apudejo estis grava

batalloko dum la revolucio de 1956.

Mia artikolo en 1995 viziis ian formorton de la kino hungara, profite al filmoj usonaj. Tamen, nun videblas, ke ĝuste la jaroj 1994-95 reprezentis malpinton por la hungara kino, kun 20 resp. nur 9 hungaraj filmoj premierantaj, kiuj interesis 286 000 resp. 323 000 spektantojn (1,8 % resp. 2,3 % de ĉiuj kinejaj vizitoj en la koncernaj jaroj). Post drama refalo de kinejo-frekventado – preskaŭ 36 milionoj en 1990, sed nur ĉirkaŭ 15 milionoj en 1992 (por 10 milionoj da loĝantoj) –, la ordo de grandeco poste restis la sama, kun osciloj, kvankam ekde 2001 denove rimarkeblas malkresko, ĝis 11,6 milionoj en 2006.

Do, averaĝa hungaro vizitas kinejon iom pli ol unu fojon jare. Por kompari eŭrope: meza franco faras tion jare 3,2 fojojn, dum la sama cifero por Hispanio estas 2,8; por Britio 2,6; por Italio 1,8, kaj por Germanio 1,7.

Kompense, la ĉiujare prezentata du-deko da hungaraj filmoj estas pli kaj pli populara. Kiam leĝo pri filmoj ekvalidis la 1an de aprilo (ja, ĝuste tiudate) de 2004, ministro pri kulturo István Hiller esprimis la deziron, ke la tiama proporcio de 5-6 % da vizitoj al hungaraj filmoj kresku ĝis 20 %. Lia deziro nun proksimas al plenumiĝo: en 2005, jaro de 17 novaj hungaraj filmoj, 1,67 milionoj elektis filmon propralandan (13,8 % de ĉiuj vizitoj), sed por 2006 la koncernaj ciferoj estis jam 24 filmoj, 2 milionoj, kaj 17,24 %. Inter la 20 plej spektitaj filmoj de 2006 troviĝis ne malpli ol kvin hungaraj. La rekord-buĝeta (ĉ. 8 milionoj da eŭroj, dekoblo de la averaĝo) kaj spektakla „*Amo kaj libero*”, datrevena filmo pri la revolucio de 1956, rikoltis pli ol 400 000 spektantojn, same kiel la komedio *Sekso kaj nenio alia*.

Preter sekaj ciferoj, impresas la kreskanta translima spektobleco de hungaraj filmoj en normalaj distribu-retoj (aŭ almenaŭ „artkinejoj”). Diversgrade sed atentinde popularis jenaj filmoj, kiujn ankaŭ mi mem rekomendas: *Sensorteco* (de reĝisoro Lajos Koltai, 2005, laŭ la romano de Nobel-premiito Imre Kertész), la originale bizara *Kontrolo* (Nimród Antal, 2003), la lugubra *Taksidermio* (György Pálfi, 2006), aŭ la animacia filmo *La oka distrikto* (Áron Gauder, 2004).

Istvan ERTL

La forgesitaj helpantoj de la esploristoj

Dum la dua duono de la 19a jarcento pluraj esploristoj, precipe britaj, travojaĝis Afrikon kaj tiel nerekte kontribuis al la koloniigo de la kontinento. Esploristoj kiel David Livingstone kaj Henry Morton Stanley ankoraŭ nun estas famaj. Pri iliaj helpantoj neniuj memoras. Aŭtune de 2007 en la londona ekspoziciejo de la brita *Royal Geographical Society* (Reĝa Geografia Societo) okazis ekspozicio kun titolo „*Bombay Africans*” (Afrikanoj el Bombajo), kiu elstarigas ilian rolon.



La sklavokomercio en okcidenta Afriko liveris homfortojn por Ameriko. Tamen en orienta Afriko la sklavoj precipe estis infanoj kaj junuloj, laborantaj kiel domservantoj en aziaj landoj. En 1833 Britio malpermesis sklavecon kaj inter 1855 kaj 1870 Bombajo estis

la bazo de la lukto kontraŭ la sklavokomercio en la Hinda Oceano. Tiel ofte okazis, ke junaj sklavoj estis liberigitaj. Tamen, ili ne revojaĝis al sia hejmlando, sed al la regiono de Bombajo, kie ili estis loĝigitaj ĉe familioj kaj en orfejoj kaj ricevis edukadon. La *Royal Geo-*



graphical Society, kiu financis plurajn esplorvojaĝojn, sugestis al siaj esploristoj tie dungi la helpantojn por la vojaĝoj. Ankaŭ okazis, ke dum vojaĝo sklavoj estis liberigitaj kaj dungitaj.

Kelkaj bombajaj afrikanoj dum longa tempo servis esploristojn kaj ludis gravan rolon. Sidi Mubarak Bombay vojaĝis 6000 mejlojn tra Afriko. Abdullah Susi, de mozambika origino, estis kunfondinto de Kinŝaso, la nuna ĉefurbo de Kongo. James Chuma asistis Livingstone dum ok jaroj kaj post ties morto mem gvidis esplorvojaĝon. Aliaj estis inter la unuaj afrikaj eldonistoj.

Roland ROTSART

Geedziĝoj stimulas konsumon

En septembro 2007 la ĉina ministrejo pri komerco aperigis enketan raporton, kiu montras, ke dum la jaro 2006 en la lando la totala konsumo pro geedziĝoj atingis gigantan sumon. Averaĝa paro da novaj geedzoj elspezis por sia geedziĝo 0,3 milionojn da juanoj. Tio egalas al la sumo de iliaj enspezoj dum kvar jaroj.

La influo de la geedziĝaj konsumoj sur la malnetan enlandan produkton (MEP) vere estas mirinda: en 2006 ili atingis 13 % de MEP! En tiu jaro en la tuta lando oni pro geedziĝoj sume konsumis varojn kaj servojn super 1500 miliardoj da juanoj (150 miliardoj da eŭroj). Ankaŭ la agrikulturo kaj la industrio nerekte je ĉirkaŭ 1200 miliardoj profitis el tio.

La ministrejo enketis 60 000 parojn en urboj kaj vilaĝoj kaj trovis, ke dum 2006-2007 ĉiu paro meznombro elspezis 4000 juanojn por vestaĵoj, 6000 por perloj kaj juveloj, 10 000 por nupto, 60 000 por renovigo de la loĝejo, 10 000 por turismo en la miela tempo kaj 40 000 por aĉeti modajn meblojn kaj modernajn

elektrajn aparatojn.

Laŭ ĉina tradicia moro la novgedzoj devas okazigi ceremonion, sin montri antaŭ siaj parencoj kaj amikoj kaj regali ilin per abunda festeno, alie ili, eĉ registritaj, ne povas esti rigardataj kiel „laŭleĝaj” geedzoj. Tial ili kaj iliaj gepatroj volas fari bonan ceremonion. Ĝenerale oni preparas 20 tablojn por la festeno. Kun 1000 juanoj por ĉiu tablo kiel kalkula normo, nova paro por tio elspezas 20 000 juanojn. Bonhavaj paroj por paradi ankaŭ aĉetas novan aŭton.

Salajro de kvar jaroj

Inter la geedziĝaj konsumoj la elspezoj por nova loĝejo okupas relative

grandan porcion. En urboj la novgedzoj meznombro pagis 163 000 juanojn por aĉeti domon. Tio estas pli multe ol la rektaj elspezoj de la geedziĝo. La ministrejo el la enketo konkludis, ke unu paro havas averaĝan monatan salajron de nur 6250 juanoj. Domo do kostas 26-oblon de la monata enspezo. La rekta konsumo pro geedziĝo alproksimiĝas al 127 000 juanojn kaj estas 20-oblo. Sume oni do nepre atingas elspezon, kiu egalas al la sumo de la salajroj de ambaŭ personoj dum kvar jaroj.

Tiel alta estas la geedziĝa konsumo, ke per sia propra ŝparmono la novgedzoj ne povas ĝin kovri. Ĉar geedziĝo estas grava afero en la homa vivo, la gepatroj do volonte donas monhelpon. Laŭ la raporto, 81,6 % de la gefianĉoj akiris diversgrade fincan subtenon de la gepatroj. Ĉirkaŭ duono ricevis de la gepatroj kaj pliaĝaj gefratoj subvencion por kovri 20 ĝis 60 % de la tuta konsumo. Por 15 % la gepatroj malavare pagis eĉ 80 ĝis 100 % de la tutaj elspezoj.

Mu Binghua



AŬSTRIO

Rekorda inflacio

En oktobro 2007 la inflacio en Aŭstrio atingis rekordan kreskon de 2,8 % en unu jaro. Tio estas konsiderinde pli ol la postulo de EU: maksimume 2 %.

Tio signifas, ke dungitoj reale perdos monon pro la inflacio kaj la plialtiĝantaj impostoj. Kiel jaran plialtigon de la salajroj la sindikato kutime postulas procentaĵon, kiu korespondas al la infla-

cio plus parto de la ekonomia kresko. Tio estus 4,5 %. Fakte dungitoj ricevos nur je inter 3 kaj 4 % pli da salajro kaj pensiuoj eĉ nur je inter 1,7 kaj 2,9 % pli.

Walter KLAG

Pri la alta cifero ĉefe kulpas la prezaltiĝoj de legomoj kaj energio. Elektra kurento kostas nun 9 % pli.

Butikumanta Litovio

Spertuloj prognozas, ke laŭ la nuna evoluo de supervendejoj en la jaro 2010 Litovio jam solide superos la averaĝon de Eŭropa Unio (EU). Tiaj vendejoj precipe ekkonstruiĝis dum la lastaj jaroj kaj Litovio jam nun antaŭas Latvion kaj Estonion. Estroj de konstrukompanioj diras, ke en ĉiuj tri landoj de Baltio supervendejoj ekestas laŭ nekredebla rapideco.



labordaŭro. Ili batalas por ke supervendejoj estu fermitaj dum Kristnasko, Novjaro kaj Pasko. Aktivuloj celas instrui la loĝantaron, por ke ili vizitu vendejojn nur dum labortagoj kaj anticipu prepariĝu por la semajnfino. La ekonomia komitato de la litova parlamento eĉ registris leĝkorekton, laŭ kiu la vendeja laboro estu malpermesata dum la ses ŝtataj festoj. Kontraŭe, komercistoj malkontentas pro la intenco reguligi la laborhoraron de vendejoj. Findecidi en tiu kverelo devos la parlamento. En la malnovaj EU-landoj jam longe ekzistas la tradicio, ke ne nur dum ŝtataj festoj, sed ankaŭ dimanĉe la vendejoj plejparte estas fermitaj.

LAST

En la najbaraj landoj la supervendejoj troviĝas precipe en la ĉefurboj, sed en Litovio estas iom alimaniere. Ankaŭ la urboj, kiuj havas 100 000 ĝis 300 000 loĝantojn – Panevėžys, Šiauliai, Klaipėda – vaste realigas la supervendejan ideon. Ĉi-momente por mil loĝantoj en Litovio estas preskaŭ 180 kvadratmetroj da komerca areo. Oni antaŭvidas, ke post tri jaroj ĝi kreskos je 40 % kaj superos la EU-averaĝon, kiu nun atingas 200 kvadratmetrojn. Onidire laŭ komerca areo en EU nun elstaras Nederlando kaj Svedio.

Dum la vendeja modo en Litovio evoluas, sindikatoj protestas pro la



Lingvo, Interreto kaj ... alio



Multajesperantistojekinteresiĝas, kiam ili vidas sur la kovrilpaĝo de iu libro aŭ broŝuro la vorton „lingvo”. La vorto „Interreto” apud ĝi eĉ pli allogas al la libro, ĉar promesas ion modernan, progresan, uzeblan. Tiuj, por kiuj navigado en Interreto, uzado de retpoŝto, reta babilado estas kutimaj aferoj, nepre trovas en la broŝuro *Lingvo kaj Interreto kaj aliaj studoj* utilajn informojn.

Tiu broŝuro estas kolekto de kontribuajoj, prezentitaj dum la vica konferenco *Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko*, okazinta en novembro 2006 en la ĉeĥa urbo Dobřichovice. *Lingvo kaj Interreto* estis ĝia ĉefa temo. La dua sekcio (kaj parto de la broŝuro) nomiĝas „Studoj pri la lingvo”, kaj ankaŭ ĝiaj prelegoj, plejparte tuŝantaj terminologiajn problemojn, ne desapon-

tos lingvoamantojn. Kaj kio pri „aliaj studoj”? Ili estas la enhavo de la tria sekcio *Natursciencaj studoj*, iom surpriza. Ĝiaj artikoloj rilatas al la protektado de vivmedio kaj labormedio. Iun, verŝajne, trankviligos, ke la tria parto konsistigas nur unu kvinonon de la libro. Aliflanke, verdire, ankaŭ tiuj neprilingvaj kaj nepriinterretaj kontribuajoj estas interesaj.

Interreto

Kiel kutime, kiam temas pri kolekto, la diskut-objektoj estas tre diversaj. El la unua kontribuajo la leganto povas ekscii, kiel funkcias Unikodo. Marek Blahuš en tre komprenebla maniero klarigas, kio estas signokodoj, Askio, kodpaĝoj, la Universala signaro kaj Universala transformo aranĝo, kaj donas praktikajn konsilojn, kiel uzi Unikodon.

Facile legebla kaj interesa estas la artikolo de Viliam Búr pri la tradukado de komputilaj programoj. La aŭtoro, mem okupiĝanta pri tia tradukado, priskribas malfacilaĵojn, kiujn devas atenti la tradukisto: ekzemple, la formaton de datoj kaj nombroj, laŭalfabetan ordigon, frazojn kun numeraloj.

Tre interesan temon por sia prelego elektis Aida Čížikaitė. Ŝi analizas nomojn, sub kiuj homoj partoprenas en retbabilejoj. Tie oni povas nomiĝi per sia vera nomo, sed ankaŭ elpensi novan. Al kiuj kriterioj devas respondi la nomo, kiel oni povas klasifiki nomojn, uzatajn en retbabilejoj, kiel elektita nomo karakterizas sian posedanton – jen estas la demandoj, diskutataj en tiu ĉi artikolo.

Ĉiu lingvoamanto certe scias, kie en Interreto troviĝas libere uzeblaj vortaroj. Ĉiu esperantisto havas inter siaj legosignoj kelkajn, kiuj indikas multlingvajn retvortarojn, inkluzivantajn Esperanton. Estas tre utile konatiĝi kun la kontribuajo de Pavla Dvořáková, kie estas priskribitaj kelkaj tiaj retvortaroj (*La*

Vortaro, Reta Vortaro, Ergane, Majstro, Traperko, Logos) kaj estas prezentitaj iliaj specifaj trajtoj kaj ebloj.

La sekva artikolo koncernas la organizaĵon *E@I*, ĝiajn celojn, historion kaj agadon, kaj la lasta kontribuajo en la unua parto estas tre simpla enkonduko en la interretan reklamadon.

Lingvo

En la dua parto plimulto de la artikoloj rilatas al esperanta terminologio. Wera Blanke rakontas pri la sorto de la ideo, kiu estis deklarita en la unua numero de la *Internacia Scienca Revuo* en januaro 1904. La revuo celis stimuli homojn verki sciencajn artikolojn por eltiri fakajn terminojn. Poste tiuj terminoj devus esti pridiskutataj de la legantoj kaj eminenta specialistaro, kaj sur tiu bazo devus esti kreitaj fak-vortaroj. Kvankam kelkaj paŝoj tiudirekten estis faritaj, plenameplekse la plano, bedaŭrinde, ne realiĝis.

Tri artikoloj estas pure priterminologiaj: Jan Werner pridiskutas ĉarpentistan terminaron, kaj Miroslav Malovec prezentas la tradukon de lernolibro pri maŝinelementoj fare de Ján Mužlay. La kontribuajo de Tibor Kepencay pro sia amplekso (19 paĝoj) alireblas nur rete. La aŭtoro konsideras grandojn, derivitajn el bazaj kvantograndoj (maso, volumeno kaj substancokvanto) per frakci-formaj rilatoj, kritikas uzatajn por ili nomojn kaj proponas novan logikan unuecan sistemon de nomoj kaj simboloj por ĉiuj tiuj grandoj.

La gravan problemon de la registrado kaj konservado de esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj ekzamenas Detlev Blanke. Lia artikolo enhavas 23 kriteriojn, laŭ kiuj oni povas priskribi kolektojn.

Aparte interesa por ni estis la artikolo de Josef Hron pri spertoj en la kompilado de granda Esperanto-nacia vortaro.

La aŭtoro informas pri uzataj komputilaj programoj kaj pri siaj eltrovoj, kiamaniere organizi la laboron kun vortoj. Li klarigas, kiel li utiligis jam ekzistantajn vortarojn kaj kiel li elserĉis mankantajn fakajn vortojn, ekzemple nomojn de animaloj kaj plantoj kaj medicinajn terminojn. Tre utilis la opinio de la aŭtoro pri specialecoj de Esperanto-naciaj vortaroj.

Alia

En la tria parto nian atenton kaptis la kontribuaĵo de Lene kaj Jan Niemann pri procedo de enigo de iu objekto en la liston de Unesko pri la Monda Heredaĵo.

Frank Nitzsche sciigas la legantojn pri klimataj kondiĉoj en laborĉambroj. Certe, ĉiuj hejtas la ĉambron, se malvarmas, kaj aerumas ĝin, kiam iĝas tro sufoke, sed en tiu ĉi artikolo oni povas trovi aldonan informon kaj konsilojn.

Du aliaj kontribuaĵoj temas pri la Serengetia Nacia Parko en Tanzanio kaj civitana agado por daŭrigeblo.

Resume

Necesas diri, ke la broŝuro enhavas por ĉiu kontribuaĵo resumojn en Esperanto kaj en la angla, germana, franca kaj ĉeĥa lingvoj kaj informas pri la aŭtoroj. Esperantajn resumojn oni povas trovi ankaŭ ĉe www.kava-pech.cz/kaest06.

Ni priskribus tiun ĉi broŝuron kiel sufiĉe facilan diversfakan legaĵon, kiu konatigas kun spertoj, klarigas fenomenojn de la lasta tempo, indikas novajn direktojn en esploro kaj agado kaj enhavas utilajn konsilojn. Do, legu pri lingvo, Interreto kaj ... alio.

Anna kaj Mati PENTUS

Zdeněk Pluhař (red.): *Lingvo kaj Interreto kaj aliaj studoj*. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2007. 136 paĝoj broŝuritaĵ. ISBN 978-80-85853-93-3.

Prezo ĉe FEL: 16,49 eŭroj + afranko

Konciza historio de la Esperantomovado en Afriko



Kvankam esperantistoj frue troviĝis en Afriko, jam en la 1890aj jaroj kaj la komenco de la dudekaj jarcento, preskaŭ senescepte ili estis eŭropanoj, deĵorantaj serve al la koloniamaj ŝtatoj eŭropaj. Ili nelonge restis, kuinte nur kelkajn jarojn, tiel ke la nombro de esperantistoj ne pliiĝis, kaj preskaŭ neniuj indiĝenoj ekkonis Esperanton.

La politika mapo de Afriko ŝanĝiĝis plurfoje dum la sekvantaj cent jaroj, kaj socia stabileco malofte, kaj kelkfoje nur efemere, okazis en la plejparto de la kontinento. Granda parto de tiu senstabileco ŝuldiĝas al la agado de la koloniantoj/koloniintoj, kiuj ne ĉiam opiniis la farton de la afrikaj landoj ĉefcelenda.

Apud granda nombro da etnaj lingvoj estis uzataj pluraj eŭropaj lingvoj: ĉefe la franca, angla kaj germana. Provoj interkomunikigi la landojn estis malmultaj kaj apenaŭ tuŝis la indiĝenajn kulturojn.

Ŝajnas, ke la malmultaj eŭropaj esperantistoj en la afrikaj landoj ne penis, aŭ almenaŭ ne sukcesis, interesi indiĝenojn pri Esperanto. Ili plurfoje provis fondi societojn esperantajn kaj eldoni gazeton, sed preskaŭ ĉiam ne daŭrajn.

Kiel Esperanto povus utili en Afriko? Laŭteorie, simile kiel en Eŭropo. Sed eŭropanoj, eŭropece pensante, ĝis nun apenaŭ sukcesis aplikigi tiujn utilojn en Afriko, inter la indiĝenoj. Se indiĝena esperanta movado estus komenciĝinta en Afriko, eble tiuj afrikanoj mem trovus proprajn utilojn por Esperanto.

La libro recenzata baziĝas sur la dua parto de disertacio, finpreparita en 1999. Ĝi prezentas informojn, laŭ afrikaj landoj, kronologie aranĝitajn, pri la esperanta movado en ĉiu afrika lando, por kiu priesperantaj detaloj troveblas. Ĝi ne estas, do, facila legaĵo. Efektive, ĝi estas tre klera informilo pri nomoj, datoj kaj ĉefaj eventoj. Granda nombro da fotoj montras al ni multajn el la koncentracioj. Tamen ĝi ne estas nur amaso da datoj kaj nomoj. Ankaŭ kritikoj pri la afrikcela agado de eŭropaj esperantistoj helpas kompreni la eventojn, same kiel ankaŭ la fiaskojn. Mi resumis la esencon de tiuj kritikoj en la kvin komencaj alineoj de ĉi tiu recenzo.

La sento ricevita de la leginto, kiam tiu fermas la libron, estas pesimisma. Mi ne kredas, ke la verkinto celis tion, nur ke tiel efikas la ekzameno de la ĝis-1999a afrika poresperanta strebado.

Por historiistoj, kaj por personoj, dezirantaj scii pri la multaj, siatempe tre reklamataj, provoj disvastigi Esperanton en Afriko, la libro estas valora. Mankas indekso, tiel ke difinitajn nomojn kaj eventojn oni malfacile trovas, sen zorge traktibri la enhavon de la verko.

Donald BROADRIBB

Heidi Goes: *Afero de espero*. Eld. UEA, Rotterdam, 2007. 86 paĝoj gluitaj. ISBN 978 92917 096 9.

Prezo ĉe FEL: 9,00 eŭroj + afranko.

33 jaroj da perfektigo

En 1974 en la rusia urbo Ufa aperis modesta broŝuro *Metodikaj rekomendoj pri la lingvo Esperanto* – fakte, malgranda lernolibro, kies aŭtoro estis tiam juna instruisto de Esperanto kaj movada aktivulo Boris Kolker. La lernilo estis tiom sukcesa, ke ĝi estis kelkfoje reeldonata kaj multfoje diversrimede multobligata kaj fariĝis la plej populara en la tiama Sovetio. Dekmiloj da esperantistoj ekposedis la lingvon helpe de ĝi; plejparto de nunaj ruslingvaj movadaj aktivuloj estas „lernintoj de Kolker”. En 1992 la lernolibron eldonis moskva akademia eldonejo *Nauka*; ĝi uzeblas (kaj konstante uzatas) en Interreto.


Tamen post la lasta papera eldono pasis 15 jaroj, kaj aperis bezono ĝisdatigi kaj perfektigi la libron. Do, la aŭtoro denove reviziis kaj aktualigis la lernilon, kaj la eldonejo *Impeto* entreprenis la novan belaspektan eldonon – rezulton de la 33-jara perfektigo de la furoraĵo.

Kio distingas tiun ĉi lernolibron de aliaj kaj kie kuŝas la kaŭzoj de ĝia populareco kaj efikeco? Unue, en la scienca aliro al la kompilo. La aŭtoro, mem sciencisto-filologo, zorge kombinis diversajn, malfacile kunmetebajn

principojn (oftecon de leksemoj kaj ilian laŭteman enkondukon, kompleksan prezenton de gramatiko kaj taŭgajn ekzercojn, ktp, ktp).

Due, la lernolibro alvokas perfektigi en la lingvo plu kaj partopreni la movadon. Por tio estas destinitaj pluraj tekstoj en la lecionoj kaj la suplemento, kiu estas la unua leciono el alia furorlibro (jam internaciskale!) de la sama aŭtoro – *Vojaĝo en Esperanto-lando* – do la deziranto jam scias pri tio, kiel „enloĝiĝi” post la kursofinon en Esperantujo, kion fari kaj kion legi por plu kreski!

Trie, kaj plej grave, la lernolibro ne nur instruas gramatikon kaj leksikon, ne nur enkondukas en la Esperanto-kulturon – tion faras ankaŭ aliaj – ĝi celas prepari ne simple bonan lingvoparolanton, sed ankaŭ aktivan movadanon, konscian propagandiston de Esperanto kaj ĝia interna ideo. Por tio fine de ĉiu el la 20 lecionoj troviĝas fragmentoj el ruslingvaj sciencaj artikoloj kaj doktoraj disertacioj pri interlingvistiko kaj esperantologio, bonaj priesperantaj artikoloj el gravaj gazetoj, fragmentoj de beletraĵoj de famaj verkistoj, kiuj pozitive rememoras sian uzadon de Esperanto, ktp.



Do, fininte la kurson (ĉu ĉeestan, ĉu korespondan aŭ interretan, ĉu okupiĝante memstare), la studanto estos bone armata per la plej gravaj kaj precizaj informoj kaj argumentoj, kiuj apogus la disvastigan entuziasmon de la nova adepto je firma bazo. Cetere, la lasta tasko de la lasta leciono sonas jene: „Verku ruse artikolon pri la problemo de internacia lingvo kaj Esperanto ...”

Certe, la lernolibro estas direktita al ruslingvanoj, kaj alilingva instruisto ne povas rekte apliki ĝin por siaj lernantoj (bedaŭrinde!). Sed uzi iujn materialojn el ĝi por prepari lecionojn ŝi/li, tamen, povas kun bona rezulto. Temas, ekzemple, pri interesaj primovadaj tekstoj en lecionoj 14-20, ekzercoj pri vortfarado kaj pri uzo de prepozicioj (kio preskaŭ ne ekzistas en aliaj lernolibroj), vasta uzo de proverboj kaj aforismoj. Tial ĝi havindas ankaŭ por ĉiu bona Esperanto-instruisto, kiu eĉ ne unu vorton komprenas en la rusa.

Nikolao GUDSKOV

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato

aŭ per www.retbutiko.net.



Boris Kolker: *Международный язык ЭСПЕРАНТО – полный учебник. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro*. Eld. Impeto, Moskvo, 2007. 264 paĝoj. ISBN 978-5-7161-0172-2.

Gentilaj animoj

Amelia X ... estas unu el la multaj konatinoj de mia edzino Hortensia. Ŝi estas mezaĝa virino, kiu loĝas kun siaj edzo kaj filo en granda moderna domo apud Bailenambeann. Laŭ la kriterioj de la lokanoj, ili estas novalevintoj, ĉar la familio translokiĝis antaŭ nur dudek jaroj de prospera antaŭurbo de Dublino. Tio por la provincoj apenaŭ estas pli ol hieraŭ. Antaŭ kvindek jaroj, kiam Amelia estis eta knabino, Irlando estis malriĉa lando, sed, kiel en ĉiuj malriĉaj landoj, iu (kvankam malgranda) proporcio de la loĝantaro vivis sufiĉe bone. Al la gepatroj de Amelia ne mankis mono, ĉar antaŭ emeritiĝo ŝia patro estis ŝtata funkciulo en brita kolonio. La familio al kutimiĝis al sufiĉe bonstata ekzisto kun indiĝenaj servistoj kaj la sociaj avantaĝoj de la kolonia rondo. Reveninte al Irlando, ili devis adaptiĝi al iomete malpli luksa vivstilo.

Kiam Amelia finis siajn lerneajn jarojn, ŝi studis zoologion en dublina universitato. Ŝi ne estis tre brila studentino, sed iel ajn ŝi sukcesis akiri stipendion por fari surlokan esploradon de la sovaĝa faŭno en Kanado. Tie ŝi renkontis Serg, filo de ukrainedvena patro kaj patrino de angla deveno. Serg estis profesia fotisto, kiu akompanis Amelian dum ŝia esplorado por foti la bestojn. Ne mallonge post konatiĝo, ili geedziĝis kaj en norda Kanado naskiĝis ilia unua infano, knabino, kiun ili nomis Stella ... Amelia decidis reiri al Irlando. La familio pasigis kelkajn jarojn en Dublino, kie naskiĝis ilia dua infano, Rufus. Amelia ne estis kontenta en Dublino. Ŝi ĉiam ambiciis esti kampara bienulino, do ili aĉetis grandegan antikvan domon kun vasta ĝardeno, kiu iam estis luksa hejmo de usona vidvino. La domo estis konstruita en tiel nomata *georgeska* arkitektura stilo (1714-1830), kiu estis ŝatata de riĉaj bienuloj dum la epoko de la angla regado. Multe da tiaj



domoj estis detruitaj dum ribeloj kaj la milito por la sendependeco, kaj poste de filistroj, kiuj preferis modernacajn konstruaĵojn. Posedantoj de georgeskaj domoj kiuj ankoraŭ restas, povas aliĝi al la prestiĝa *Georgeska Societo*. Kompreneble Amelia aliĝis al ĝi. Bedaŭrinde la domo dum longa tempo restadis vaka, kaj ĝi estis terure difektita de vandaloj kaj de la malseka mez-irlanda vetero. Serg obstine klopodis ripari la damaĝon, sed finfine trovis, ke oni bezonus multe da mono por restaŭri tian antikvaĵon.

Intertempe, Stella diligente studis kaj iĝis diplomita malsanuleja flegistino. Ŝi laboris eksterlande kaj enlande, kaj dum ferioj en Irlando, ŝi fianĉiĝis kun juna gisisto, kiu kunhelpis ĉe la restaŭra laboro en la domo. La patro de la junulo estis iu Liam Murphy, tria violonisto en la nacia orkestro, kies edzino iom pretendeme elektis por sia filo la personajn nomojn de sia plej ŝatata fama komponisto. La gepatroj iom seniluziiĝis, kiam ili poste konstatis, ke la filo, Wolfgang Amadeus

Murphy, havis absolute nenian muzikan aŭ intelektan talenton. Pro tio Wolfgang rezignis pri sia fortepiana studado, por kiu la patro abnegacie pagis el sia ne tro plena poŝo, lernis la gisistan metion kaj danke al tio renkontis kaj ekamis Stellan. Vee, la amrilato de la juna paro ne longe daŭris, ĉar la amato estis iom malĉarma. Stella trovis novan postenon en Aŭstralio, dum Wolfgang Amadeus forlasis sian gisistan karieron, kaj sin metamorfozis de humila laborista krizalido en multkoloran artistan papilion. Tio bezonas klarigon.

Dum pluraj jaroj, Irlando konstante gajnis la maksimuman nombron da poentoj en la Eŭrovizia Kantkonkurso. Ties unua sukceso okazis, kiam ĉarma juna nordirlanda knabino, nome Dana, kantis simplan, sed allogan sentimentalan kanteton kun la titolo *Ĉia speco de ĉio*. Sekvis aliaj sukcesoj, sed la kvalito de la konkursaĵoj, kvankam en la komenco pli-malpli melodijaj, iĝis iom post iom malpli muzikecaj, en la preciza

senco de la vorto. La kulmino de tiu degenaro okazis, kiam Wolfgang Amadeus Murphy prezentis sian konkursaĵon *Hej, hej, Baby, vi estas vere friska*. (Kredeble, „friska” ne signifas „malvarmeta”, sed estas traduko de usona esprimo, kiu ne havas klaran sencon, sed aludas al io ajn, kion la junularo aprobas.) Ĉe la konkurso, Wolfgang, akompanata de grupo da sentalentaj dancantinoj, laŭte frapegis malagorditan gitaron, kiun li neniam lernis ludi, muĝis kaj stamfis kiel virbovo, kaj ege plezurigis la internacian aŭskultantaron. Kompreneble li gajnis. Ekde tiam, malgraŭ la fakto, ke li kaj tiu kanto estas forgesitaj en ĉiu lando krom Irlando, li furoras kiel rokantisto en la trinkejoj de provincaj urbetoj kaj vilaĝoj en sia lando.

Intertempe, Stella, kiu estas tre simpatia virineto, trovis francan koramikon. Ĝis nun, la gepatroj ne havis okazon renkonti lin, sed Amelia estas ravita, ĉar unu el ŝiaj plej grandaj deziroj estis tio, ke ŝia filino edziniĝu kun franco (iu ajn franco). Ŝi estas konvinkita, ke ĉiuj francoj estas ĉarmaj, elegantaj kaj kulturaj. Amelia tre aprezas la kulturon. En la ĉiutaga vivo ŝi estas ege ŝparema pri bagatelaĵoj. Ŝi kalkulas ĉiun cendon, kiun Serg elspezas (ĉar estas Serg kiu faras la doman aĉetadon kaj kuiradon), sed ĉiujare la paro elpoŝigas amason da mono ĉe operfestivaloj, koncertoj en kasteloj kaj palacoj, kaj teatraĵoj. En tiaj okazoj oni havas la impreson, ke por ŝi la vera allogaĵo ne estas la muziko aŭ la spektaklo, sed la ebleco renkontiĝi kaj konversacii kun anoj de la alta socio – ne la kreskanta socio de novriĉuloj, sed la antikva aristokrataro de angla deveno, kiun la dramisto Brendan Behan iom malĝentile nomis la *angloirlandaj ĉevalprotestantoj*. Kiam mia edzino Hortensia menciis, ke dum kampanjo por naturprotektado, en kiu ŝi aktivis, ŝi ricevis neatenditan apogon de Lordo kaj Lordino Ballyporeen, Amelia fiere diris: „Mi alparolas ilin per iliaj nomoj Albert kaj Valerie.” Tio tre imponis al Hortensia.

Malgraŭ la fakto, ke Serg bone kuiras, Amelia pli ofte nutras sin per

ĉokoladbiskvitoj, kukoj kaj dieta kokakolao. Kompreneble, tio ne estas tre sana nutromaniero, do ŝi konstante sentas sin malsaneta. Ŝi konvinkis sin, ke ŝi estas inklina al pluraj alergioj. Alergiajn perturbojn kaŭzas al ŝi laktuko, cepoj kaj multaj aliaj legomoj, fruktoj, kuiritaj manĝaĵoj, nekuiritaj manĝaĵoj, kafo, teo, ktp. Sekve ŝi suferas de mallakso, lakso, maldigesto, kaj diversaj aliaj maloportunecoj, kiujn, pro diskreteco, oni ne menciis.

La nuna domo de Serg kaj Amelia estas tre komforta, kvankam ĝi ne estas georgeska. Ĝi estas tre moderna, konstruita laŭ medi-amikaj principoj kaj havas la plej modernajn domaparatojn. Ĝi estis antaŭfabrikita en Germanio kaj muntita de germana teamo da metiistoj. Por mendi la domon, Serg kaj Amelia devis vojaĝi trifoje al Germanio. La mendo kaj la konstruo prezentis problemojn, ĉar nek Serg nek Amelia parolas la germanan, kaj la antaŭfabrikistoj ne komprenis la anglan. Plie, la registaraj reguloj pri konstruado en Germanio kaj Irlando estas malsamaj kaj malsimilaj. Tamen, finfine ilia nova hejmo estis konstruita. Iu amikino de Hortensia vizitis la domon kaj demandis pri funkciado de la ŝajne komplikaj modernaj kranoj en la kuireja lavopelvo. Amelia devis konfesi, ke ŝi ne scias. Tio estas tute komprenebla, ĉar la tutan laboron en la kuirejo faras Serg. La resto de la hejmlaboro estas farita de Maria, la dompurigistino. Amelia estas tro okupita por fari hejmajn taskojn. Pri kio ŝi estas okupita, tio ne estas evidenta. Ŝi havas laborejon kun la plej lasta modelo de komputilo, sed oni neniam vidis ŝin laboranta per ĝi. De temp’ al tempo ŝi entuziasmiĝas pri diversaj branĉoj de studado. Sinsekve ŝi komencis la studadon de hispana lingvo, flamenka gitaro, franca lingvo, geologio, arkeologio, ktp, sed neniam finis iun ajn el la kursoj. Ŝi imagas, ke ŝi bone scipovas la francan, do kiam Stella (kiu intertempe kvalifikiĝis kiel diplomita flegistino) estis akceptita de filantropia organizaĵo por labori kiel volontulo en meza Afriko, Amelia proponis al sia filino lecionojn pri la franca

lingvo. Bedaŭrinde la franca vortprovizo de Amelia estis magra. En la lando, kie Stella devis deĵori, estis konstanta malpaco inter la diversaj triboj. La malsanulejo, en kiu ŝi laboris, ĉiam estis preta ricevi vunditajn militistojn de iu ajn armeo, sed la hospitalestraro insistis, ke por esti akceptitaj kiel pacientoj, tiuj devis senigi sin de *armiloj* kaj *uniformo*. Tiujn vortojn Stella ne konis, nek en la indiĝena lingvo, nek en la franca. Do ŝi ne ne povis peti, ke la soldato forprenu sian uniformon. Pro tio ŝi petis, parte per vortoj, parte per gestoj, ke li „nudigu” sin. Tio konsternis la pacienton, kiu estis islamano, kaj do ne kutimis nudigi sin antaŭ virino. Feliĉe, Stella estas pli bona flegistino ol lingvisto.

Kiam Hortensia menciis al Amelia, ke ŝi intencis partopreni altlernejan kurson pri ekologio por pli aĝaj studentoj, Amelia entuziasme diris, ke ŝi ankaŭ partoprenos. Por Hortensia, tio estus tre konvena, ĉar Amelia kaj Serg, kiuj zorgas pri la neceso protekti la medion, posedas grandan aŭtomobilon (fakte *du* aŭtomobilojn, kio al ni ne ŝajnas tre medi-amika konduto). Hortensia ne havas veturilon, krom malnova biciklo, do ne povas facile atingi la foran altlernejon. Por aliĝi al la kurso, kandidatoj devas plenigi longan demandaron pri antaŭaj kvalifikoj. Sur la formularo, Amelia respondis, ke ŝi jam trifoje komencis postdiplomajn universitatajn kursojn, sed ne daŭrigis iun ajn. Kompreneble, la estraro de la altlernejo ne rigardis tiun detalon kiel bonan rekomendon. En la semajno, kiam devis komenciĝi la kurso, Hortensia telefonis al Amelia por demandi, ĉu ŝi estas preta por veturi al la altlernejo. Amelia lakone respondis, ke ŝi decidis ne partopreni; ŝi preferas dediĉi sin al sia ĝardeno.

Mia edzino ofte havas interesajn konversaciojn kun Amelia. Pli ofte Amelia parolas pri siaj alergioj (laŭŝajne ŝi supozas, ke inklino al alergioj riĉigas ŝin per pli da socia statuso). Por zorgi pri siaj imagitaj sanaj kaj psikaj necesoj, ŝi konsultas tutan teamon da specialistoj: oftalmologo por la okuloj, dermatologo por la haŭto, enterologo por la intestoj,

psikiatro por la menso kaj ginekologo por mi-ne-scias-kio. Plie, ŝi havas familian kuraciston por skribi leterojn atestantajn, ke ŝi malsanas. Ofte ŝi menciis la koncertojn kaj operojn, en kiuj ŝi kaj Serg ĉeestis. Kelkfoje ŝi parolas sen efektive diri ion ajn. Iam, tute senrilate, ŝi diris al Hortensia: „Ĉiutage mi lavas min, kaj trifoje en ĉiu semajno mi duŝas min”. Al persono, kiu ne konas la irlandanojn, tiu aserto eble donus la impreson, ke tia higiena konduto estas maloforta inter irlandanoj – malprava supozo. Pro tio, Hortensia ne sentis neceson gratuli ŝin.

Krom Stella, Serg kaj Amelia havas filon, kies nomo estas Rufus. Kiam Rufus estis tre juna, Amelia konvinkis sin, ke li estas aparte talenta. Al li ne mankas inteligento, sed en la bazlernejo la instruistino supozis, ke li estis iom disleksia, do li devis ĉeesti specialan klason pri legado kaj skribado. Kredeble, la kaŭzo de lia problemo estis ne disleksio, sed maldiligento, kaj la problemo daŭras. En tri malsamaj universitatoj, Rufus registris sin kiel studenton, sed li forlasis du el ili sen kompletigi la kurson, ĉar ne plaĉis al li ties etoso. La trian universitaton li trovas pli kontentiga, ĉar tie abundas trinkejoj kunuloj, kaj iom malĉarma, sed konsentanta amikino. La fakto, ke al ŝi mankas ĉarmo, ne gravas, ĉar Rufus mem estas aparte malĉarma junulo.

En la mallaborema periodo inter la ĉesigo de sia unua universitata kurso kaj la dua, li vojaĝis al Andaluzio, supozeble por studi (kiel lia panjo) la hispanan kaj la flamenkan gitaron. Por subteni sin, li laboris kiel verŝisto en trinkejo, kies proprietulo estis irlandano. Eble pro tio, li faris (same kiel sia panjo) malmultan progreson ĉe sia studado de ambaŭ lernobjektoj. Tamen, kiam li revenis hejmen, Amelia fanfaronis al ĉiuj el siaj geamikoj pri la flua hispana kaj bona gitarludado de sia talenta filo. Kiam Rufus rekomencis sian studentan karieron en sia tria universitato, lia patrino pretendis, ke li finfine atingos elstaran sukceson. Bedaŭrinde li ne legis la postulatajn lernolibrojn, ne ĉeestis lekciojn, kaj ne studis. Almenaŭ unufoje li forgesis, ke



li havas ekzamenon kaj restis en la lito; alian fojon li alvenis al la ekzamenejo sen sia registrokarto, do ne estis enlasita.

Al Rufus ĉiam mankis mono. De la gepatroj li ricevis ĉiusemajne monasignaĵon je la sumo de cent eŭroj, sed li konstante perdis sian monujon, aŭ sian bankkarton, aŭ li forgesis sian personan identigan numeron. (Plie, kiam li estis en Hispanio, li perdis plurajn pasportojn kaj ĉiufoje li devis peti novan ĉe la konsulejo de Irlando). Do Serg insistis, ke li trovu laboron dum la longaj someraj ferioj. Ĉiutage Rufus restas en la lito ĝis la unua aŭ la dua posttagmezo. Ĉe apero post lia longa dormo, kaj post malurĝa manĝo, la patro elĵetas lin kaj postulas, ke li serĉu pagatan okupon. Kompreneble, je tia malfrua horo, vakaj postenoj apenaŭ estas troveblaj. Plie, oni dubas, ĉu Rufus diligente serĉas. La patro malesperas. Li plendis: „Neniu volas dungi lin – eĉ ne por vendi fragojn je la flanko de la ŝoseo. La ĉefa kaŭzo estas, ke li malbone odoras, ĉar li neniam lavas sin”. Ĉu Rufus lavas sin aŭ ne, li certe malbone odoras, ĉar li preskaŭ senhalte fumas, krom en la domo, kie fumado estas malpermesita. Je plia insistado de la patro, Rufus kandidatis por diversaj vakaj postenoj, sendante al eblaj dun-

gontoj kvindek leterojn kun vivresumo. De la leteroj li ricevis neniun respondon pro la fakto, ke li malĝuste indikis sian telefonnumeron.

Lia patrino estas pli indulga kaj malofte kritikas sian amatan filon.

Ĉiulunde, Rufus vojaĝas per buso al la universitato, kiu situas sufiĉe distan- ce de la hejmo. Ĉiuvendrede, li revenas. Bedaŭrinde la buso ne trapasas Bailnambeann, do lia patro devas veturigi lin al vilaĝo Bailepoitin sur la ŝoseo inter Galway kaj Dublino, kie la buso haltas. Je la vendreda reveno Rufus preskaŭ ĉiam dormas pro la streĉo kaŭzata de longa studado en trinkejo. Plurfoje, li ankoraŭ dormis, kiam la buso preterpasis la haltejon, kaj li ne vekigis. Ĝis ĝi alvenis en urbo Galway. Tiam Sergio devas veturi cent kilometrojn por revenigi sian filon al Bailnambeann. Feliĉe, Rufus kutime portas poŝtelefonon (kiun, malfeliĉe, li ofte perdas), kaj se ĝi troviĝas en lia poŝto, la gepatroj povas telefone vekigi lin en la ekzakta momento, kiam la buso proksimiĝas al Bailepoitin. Do, al ĉiu problemo Serg trovas solvon.

Laŭ Amelia, malgraŭ la etaj neperfektaĵoj de ŝia filo, Rufus estas esence saĝa junulo kun valora vivsperto. Ŝi informis Hortensian, ke en lia studentloĝejo li agas kiel konsilanto por

siaj kunstudentoj (fakte, precipe por la studentinoj), kiuj turnas sin al li serĉante respondojn al siaj am- kaj stud-problemoj. La fakto, ke Rufus ne kapablas solvi siajn proprajn personajn problemojn, ne malinstigas lin je tiu pia servo.

Iam Serg kaj Amelia ĝentile invitis nin akompani ilin al koncerto en granda kastelo norde de nia urbo. Dum la veturado, Serg plendis pri la pigreco de sia maldiligenta filo, kiu refoje malsukcesis en siaj ekzamenoj. Hortesia paroladis pri io alia. Nun, kiel mi jam menciis, Amelia aparte ŝatas eventojn en grandaj kasteloj, kie ŝi povas konversacii kun la elituloj de la irlanda socio. Kiam ni eniris la salonon, kie okazos la koncerto, elegante vestita damo alproksimiĝis al ŝi kaj laŭte kriis per aristokrata angla akĉento: „Ah, Amelia, kia plezuro revidi vin! Kiel fartas kara Rufus? Ĉu li ankoraŭ estas studento?” Amelia respondis, ke Rufus fartas tre bone kaj ha-

vis tre sukcesan jaron en la universitato. „Kaj via bela georgeska hejmo?” Amelia devis respondi, ke ili ne plu posedis la antikvan domon, sed nun havas belan modernan.

Hazarde, inter la aŭskultantaro ĉe la koncerto troviĝis profesoro pri arkeologio, kiu iam instruis (aŭ provis instrui) Rufuson en sia unua universitato. Li faris similan demandon pri la progreso de Rufus. Amelia respondis: „Bonega! – Ne tiom en la ekzameno pri arkeologio, sed li aparte bone faris en la filozofia. Li tre ŝatas filozofion.” Tiu aserto surprizis nin, ĉar filozofiaj tendencoj ne estas tuj evidentaj en la karaktero de Rufus. Aliflanke, la vivmaniero de Diogeno en lia barelo eble ne tro malsimilis tiun de la filo de Amelia kaj Serg.

Ni ofte demandas nin, kiel tiuj geamikoj niaj vivtenas sin. Estas evidente, ke nek Serg nek Amelia havas dungitajn postenojn. Ni supozas, ke la forpasin-

taj gepatroj de Amelia ne estis malriĉaj kaj posedis domhavaĵon en la ĉefurbo. Ŝi heredis tiun posedaĵon en malbona ekonomia konjunkturo, kiam oni povis tre malmultekoste aĉeti apartamentojn. Serg kaj ŝi iĝis proprietuloj de pluraj, kiujn ili luigis. Tio permesis, ke ili vivu sen eligi ŝviton.

Pri Serg mi malmulte diris. Li estas milda, ĝentila viro, kiu neniam kverelas. Li ne parolas la ukrainan lingvon de siaj geavoj, enmigrintoj en Kanadon, sed li iom scias pri la indiĝenaj lingvoj de Nord-Ameriko, kaj kelkfoje interese rakontas pri sia antaŭa vivo en sia naskiĝlando.

Entute, Amelia kaj Serg estas afablaj homoj. Oni ne povas kritiki virinon, kiu (supozeble) inspiris la filinon dediĉi sian vivon al malpli feliĉa popolo en Afriko, nek viron, kiu ne estis tentata sufoki sian malbonodoran kaj pigran filon.

Albisturo KVINK



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbuto.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

... **jarfine** al IF! Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por fami-luoj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prele-ga programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera pro-pono, kun silvestra bufedo kaj silves-tra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.interna-cia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita re-vuo por nudistoj/naturistoj/ nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Natu-rista Orga-nizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Esperantistaj foto- kaj filmamatoroj, vizitu www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj ver-koj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonce-to ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli gran-daj anoncoj petu la tarifon de la el-donejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR

30 USD

aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom



REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru


Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

La jaro 2008

Via poŝamiko dum la tuta jaro 2008 (kaj pli)



Poŝkalendaro

- kun spaco por fari notojn,
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

Enciklopedieto

- kun la ŝtatoj de l' mondo,
- kun ĉefurboj, loĝantoj, surfaco ktp ktp,
- kun indiko kiel telefoni el kaj al eksterlando
- kun radioprogramoj en Esperanto
- kaj multe pli

Mendu ĝin tuj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000, Antwerpen, Belgio
retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto
(vidu liston kaj prezojn en p. 4).

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun por la 3 venontaj jaroj (5 % da rabato) aŭ por la 5 venontaj jaroj (10 % da rabato!).